# *Irana ministro pri eksteraj rilatoj vizitas Libanon*



Bejruto, a?g 14 (RHK) La ministro pri eksteraj rilatoj de Irano, Mohammad Yavad Zarif, dialogos hodia? kun kelkaj funkciuloj de Libano, en la komenco de neatendita vizito.

Zarif anta?vidas pritrakti la eksplodojn en la haveno de Bejruto, la helpon iranan nun okazanta kaj aliaj pri reciprokaj rilatoj, informas noto de la koncerna ministerio sen precizigi detalojn.

La? aktuali?oj, la forpasintoj pro la eksplodo kreskis ?is 178 kaj pli ol 6 500 la vunditoj.

La vizito de Zarif en Libano koincidas kun tiu de la vic-sekretario usona de ?tato, David Hale, kaj post nuligo de vizito de la irana vicprezidento Eshaq Jahangiri.

Hale devos renkonti?i kun la prezidento de la respubliko, Michel Aoun, la interna estro de la registaro, Hassan Diab, kaj la parlamentestro, Nabih Berri.

Anka? planas kunsidi kun tradiciaj aliancitoj de Usono en tiu lando, kiel la eksa ?efministro Saad Hariri, estro de la partio Futuro-fluo kaj la estroj de politikaj dekstrulaj grupoj Fortoj Libanaj, Kataeb kaj socialista partio progresista.

Francio, Usono kaj landoj de la Golfo premas por rapida instalado de registaro de supozata nacia unueco en Libano, kiu ekskludu Hizbulah kaj Liberan Patrolanda-fluon, ?i-lasta fondita de la ?tatestro Michel Aoun.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/231579-irana-ministro-pri-eksteraj-rilatoj-vizitas-libanon

**Radio Habana Cuba**